KUNLABORO DE STUDENTOJ DE UTA
KUN
EŬROPA CENTRO de INTERKULTURA EDUKADO (Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej)

Venis la tempo por studentoj de UTA (Universitato de la Tria Aĝo) - ĉe la Akademio de Korpa Edukado en Vroclavo je la nomo de Polaj Olimpikistoj, ke ili iom fanfaronas pri siaj aliaj agadoj.

La fanfaronulino staris en la angulo..., sed se ŝi nur tiel starus, neniu scius kiel ŝi agis dum la pandemio kaj dum la pasinta jaro 2022..., tial hodiaŭ estos iom da laŭdoj, sed de alia flanko, ne nur la universitata.

La studentoj-pliaĝuloj de la Universitato de la Tria Aĝo aktive partoprenas en diversaj projektoj, inkluzive de tiuj realigataj de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (ECIE). Ĝi estas asocio, kies prezidantino estas s-ino Małgorzata J. Komarnicka, Esperanto-instruistino, tradukistino, ĵurnalistino, filozofino, interlingvistino. La asocio okupiĝas interalie pri la promocio de multkultureco kaj lernado de Esperanto, kaj ankaŭ pri diversaj projektoj preparitaj ĉefe por pliaĝuloj.

Fine de la jaro 2022, kadre de la ECIE-projekto "Feliĉaj, kreivaj kaj aktivaj", aperis la unua volumo de la libro "Legendy sześciu kontynentów - Legendoj de ses kontinentoj". La libro estas prilaborita en la pola kaj Esperanto. En tiu ĉi unua parto estas prezentitaj 21 legendoj el sep landoj kaj tri kontinentoj (Eŭropo, Norda kaj Suda Amerikoj). La legendojn prezentis eksterlandaj esperantistoj, kaj Małgorzata Komarnicka tradukis ilin por ni.



Ĉiu legendo kadre de la "Kreadaj Laborsesioj" de ĉi tiu projekto postulis ilustraĵojn, propran kreivon kaj ideon. Okazis, ke la aŭtorinoj de preskaŭ ĉiuj ilustraĵoj estas niaj studentoj-pliaĝuloj. En la projekto partoprenis la jenaj personoj: Danuta Durman-Ulatowska, Joanna Kwiatkowska, Irena Solarek, Czesława Śliwińska kaj Renata Gładysiewicz, kaj Zdzisława Hampel (for de la universitato). La ilustraĵoj estas faritaj per diversaj teknikoj: krajono, karbokrajono, akrilaj kaj oleaj farboj, sur vitro, papero, tabulo, tolo. Estas kungluaĵoj, vitraloj, decoupaĝoj. Kelkaj el ni desegnis aŭ pentris ion unuafoje. Valora aldono estas, ke la libro ankaŭ inkluzivas mallongan priskribon de la lando kaj kontinento de kiuj devenas la legendo

La libro jam ricevis multajn pozitivajn recenzojn el eksterlando kaj el Pollando. Dum la *Koncerto de la Premiitoj* de la 10-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj kaj dum la *Tagoj de Pliaĝulo 2022* en la salono *Przestrzeń Trzeciego Wieku* okazis ekspozicio de la ilustraĵoj de la aŭtorinoj. La ekspozicio estis tre populara ankaŭ inter eksterlandaj gastoj. La unuaj artikoloj pri la libro estis jam publikigitaj, interalie en la germana-esperanta revuo "Esperanto aktuell" kaj en la Esperanta kvaronjara gazeto "Juna Amiko". La libro estis financata el rimedoj de la Urbo Vroclavo.

Krom ĉi tiu projekto, en la jaro 2021 studentoj-pliaĝuloj de nia UTA partoprenis en la preparado kaj eldonado de gvidlibro pri Vroclavo "Spacerkiem po Wrocławiu - Promene tra Vroclavo". La projekto ankaŭ estis realigita fare de ECIE. En la gvidlibro estas priskribitaj ses

irvojoj (pli mallongaj kaj pli longaj) por viziti Vroclavon, kaj ĉiu irvojo komenciĝas ĉe la Ĉefa Fervoja Stacidomo. La gvidlibro estas destinita por ĉiuj, ne nur por pliaĝuloj. En ĉi tiu projekto partoprenis la jenaj personoj: Teresa Tadeuszyk, Irena Solarek, Joanna Kwiatkowska kaj Bogdan Partyka. La laboro por ĉi tiu projekto estis tre malfacila ĉar pandemiaj limigoj (KOVIM 19) ne permesis multon agi. La resumo de la projekto estis organizita dum la *Tagoj de Pliaĝulo 2022* en la salono de la Vroclava Centro de Socia Disvolviĝo. La resuma renkontiĝo estis tre interesa. Partoprenis en ĝi la aŭtoroj kaj Zbigniew Magdziarz, la prezidanto de la Societo de Vroclavo-Amantoj. La gvidlibro estis financata el rimedoj de la Urbo Vroclavo.

La tria ECIE-projekto en kiu niaj studentoj (Irena Solarek, Joanna Kwiatkowska, Renata Gładysiewicz) partoprenis en 2021 estis "Eko-Espero, Ĉu ekologio ankoraŭ estas modo aŭ jam nia devo". La ĉefa tasko de la projekto estis veki ekologian konscion en la partoprenantoj kaj kiel pere de tio ŝanĝi rilaton al la vivo. La projekto ampleksis serion da renkontiĝoj, kiuj interalie proponis preparadon de san-manĝoj el organikaj kultivaĵoj, prezentadon de interesaj solvoj por denove eluzi diversajn specojn de ĉiutagaj objektoj kaj samtempe savi la hejman buĝeton. La mezurebla efiko de la projekto estas sekva prilaboraĵo, kiu enhavas receptojn por la menciitaj sanaj pladoj, gimnastikajn ekzercojn, ktp. La broŝuro estis financita el la buĝeto de la Marŝala Oficejo de Malsupra Silezio. Valoras substreki, ke la agadoj de niaj pliaĝuloj en ĉi tiu projekto subtenis ankaŭ Teresa Tadeuszyk, la kunlaborantino de la UTA tiutempe.



La aŭtorino de ĉiuj prezentitaj projektoj estas Małgorzata Komarnicka.

Joanna Kwiatkowska i Irena Solarek
UTA (Universitato de la Tria Aĝo) - ĉe la Akademio de Korpa Edukado je la nomo de Polaj Olimpikistoj en Vroclavo
Vroclavo, 20.01.2023